# NIA PONTO

Grupo Esperantista de Bilbao
Barrencalle Barrena, 7-1ª dekstr
48005-BILBAO (Hispanujo)
Redaktas:
Jesús Miguel García Iturrioz

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 619.694.683 (Iciar)
☎ 658.709.087 (Jesús)
💻 esperantobi@gmail.com

**La E-Grupo de Bilbao estis fondita la 20an de majo de 1906**
TTT-ejo: https://sites.google.com/site/esperantobi/home
En Fejsbuko, serĉu "esperanto grupo bilbao"

**Jar-kotizoj**: Normala: 60 €. Familia: 70 €. Juna(ĝis 30 jaroj): 20 €.
**KUTXABANK-konto. IBAN-kodo: ES56-2095-0141-4122-1800-1550**

**APRILO/JUNIO 2023 Nro. 135 (2/23)**

## ASAMBLEA GENERAL ORDINARIA (Y EXTRAORDINARIA).

Por la presente, y según exigen sus estatutos, se convoca la asamblea general, ordinaria y extraordinaria, del Grupo Esperantista de Bilbao para el próximo **viernes 26 de mayo, a las 18,00 h.**, en su sede de Barrencalle Barrena, 7-1º dcha., con el siguiente

**Orden del día**:

1. Lectura y aprobación, si procede, del acta de la asamblea general anterior.
2. Aprobación, si procede, del resumen de gastos e ingresos del año 2022.
3. Aprobación, si procede, del presupuesto para el año 2023.
4. Posible subvención para acudir a algún congreso de Esperanto.
5. Iniciar, o no, los trámites para acceder a la propiedad de la sede por usucapión.
6. Iniciar, o no, los trámites para el reconocimiento del Grupo como asociación de utilidad pública.
7. Obras, excesivos gastos y búsqueda de soluciones.
8. Ruegos y preguntas.

Nota: **la hora límite para terminar la reunión será las 19:30 h.** ya que profesores y alumnos tienen que comenzar, a esa hora, la clase correspondiente del actual curso de Esperanto. **Atención a la hora de comienzo: 18:00 h**.

## LLAMAMIENTO A PARTICIPAR EN LA ASAMBLEA.

Como podéis ver a través del orden del día, los temas a tratar en la asamblea de este año son tan importantes que las decisiones que tomemos van a afectar a la propia existencia del Grupo. Por ello, más que nunca, hacemos un llamamiento para que acudáis a la asamblea.

**LOKE ...**

## ĈIUJARA ĜENERALA KUNVENO.

Tiel kiel vi povas hispane legi supre, la **vendredon 26-an de majo, je la 18,00 h.**, oni okazigos la ĉiujaran ĉiesan kunvenon de la E-Grupo de Bilbao en ĝia sidejo de Barrencalle Barrena, 7-1ª dekstre laŭ la suba

**TAGORDO**:

1. Legado kaj aprobo, se indus, de la protokolo de la lasta kunveno.
2. Same pri la spezoj de la jaro 2022.
3. Same pri la buĝetpropono por la jaro 2023.
4. Ebla subvencio por partopreni E-kongreson.
5. Komenci, aŭ ne, la demarŝojn por fariĝi propietuloj de la sidejo per "usucapión".
6. Komenci, aŭ ne, la demarŝojn por iĝi asocio de publika utileco.
7. Riparoj en la konstruaĵo, troaj elspezoj kaj propono de solvoj.
8. Proponoj kaj sugestoj.

Noto: **limhoro por fini la kunvenon: 19:30 h.**, ĉar gelernantoj kaj instruistoj devos ĉeesti la elementan E-kurson. **Atentu pri la komencohoro: 18:00 h**.

## ALVOKO ĈEESTI LA ĜENERALAN KUNVENON.

Kiel vi povas konstati laŭ la tagordo de la jara kunveno, la graveco de la aferoj, kiujn ni pritraktos estas sufiĉe granda ĉar ni devos preni decidojn, kiuj rilatas al la estonteco de la Grupo. Do, pli ol neniam antaŭe ni petas vian ĉeeston.

## Riparoj en nia Grupejo.



Antaŭ ol la komenco de nova kurso, kelkaj Grupanoj decidis iom beligi nian multaĝan klubejon.

Ili komencis per renovigo de la muroj de la klasejo, poste de la necesejo kaj, fine, anstataŭigo de malnovaj lampoj, kiuj ne liveris tiom da lumo, kiom estas necesa.

Dankon al ili ĉiuj: Diego, Edorta, Alberto, Octavio, Mila, ...

## LOKE ...

## Nova elementa kurso.




La pasintan vendredon 10an de marto ekiris nova elementa kurso en nia sidejo. Ĝi okazos ĉiuvendrede inter la 19:30 kaj la 20:30 h. Kiel kutime ĝi estos senpaga; tamen, ni postulas la koston de la libroj, kiu estas, pli malpli, 30,00 eŭroj.

Ĉi foje la kurson gvidas tri instruistoj: David Redondo, Hodei Redondo kaj Edorta Moreno.

Sur la foto, parto de la gelernantoj, kiuj atenteme aŭskultas la klarigojn de Hodei, nia plej juna esperantisto: nur 16-jara.

## Nova vidkunveno.




La pasintan 22an de aprilo, kunordigata de nia amiko Konrad Fischer el Tubingo (Germanujo), oni okazigis novan internacian retkunvenon de ĝemelaj urboj.

En amika etoso ĝin partoprenis dek homoj, inter ili nia prezidanto Pako.

Oni parolis pri aktualaj novaĵoj el niaj grupetoj, pri la plej proksima UKO en Torino, pri esperantistoj el Tanzanio, kaj pri ideoj por trovi monon por subteno de la sidejo de la Esperanta Grupo de Bilbao.

Ni ankaŭ ludis trovante kaŝitajn vortojn kaj divenante rompopecajn bildojn. Daŭro de la kunveno estis unu horo kaj duono.

**H.E.F.**

## La venonta HEF-kongreso en Sevilo.




La venonta Hispana Kongreso de Esperanto okazos **de la 12a ĝis la 15a de oktobro** en Sevilo. La ĉeftemo de la renkontiĝo estos "Esperanto, komprenemo inter popoloj". Ĉiuj jam povas proponi sin por prelegi pri temo rilata al tiu afero aŭ ĝenerale pri kiu ajn temo rilata al la internacia lingvo. Same, ene de la kultura flanko kiu ajn povas proponi aktojn kiuj povus esti aranĝitaj dum la kongreso kaj pli specife ene de la programero "Vivu la Teatro".

*(J.M.R., Membro de la Organiza Komitato. 30/01/2023)*

## LEGADO DE DONKIĤOTO.




Lectura de El Quijote en Esperanto en El Círculo de Bellas Artes por Elsa y Miguel

La 20an de aprilo, du esperantistoj, Miguel kaj Elsa, partoprenis la sinsekvan legadon de la verko Don Quijote, organizatan de la Círculo de Bellas Artes. Ambaŭ legis po unu pecon de la traduko en Esperanton de tiu fama verko.

Vi povas spekti ilian legadon en la adreso: https://www.youtube.com/watch?v=J6CyZ31QN_w.

*("Nia Voĉo". Organo de Madrida E-Liceo. Majo 2023)*

## LIBRO DE DELIBES TRADUKITA AL ESPERANTO.




Aperis la traduko al Esperanto de unu el la ĉefaj romanoj de la kastilia verkisto Miguel Delibes. La romano titoliĝas *Sinjorino en ruĝo sur griza fono* (*Señora de rojo sobre fondo gris*), kaj ĝi estas unu el la plej personaj verkoj de Delibes, kun klaraj membiografiaj referencoj kaj omaĝo al lia edzino, Ángeles, forpasinta nur 51-jaraĝa.

Ĝi estis tradukita de la konata aŭtoro kaj tradukisto **Antonio Valén**, kaj eldonita de Mondial, kunlabore kun la zaragoza **Fondaĵo Esperanto**.

Ĝi estas la unua tradukita al Esperanto verko de Miguel Delibes (1920-2010), eble la plej populara verkisto en Kastilio en la mezo de la 20a jarcento.

*(La bitbulteno de HEF. Nro. 87. Aprilo 2023)*

## ESPERANTO EN LA TAGO DE LA LIBRO.







Madrida Esperanto-Liceo estis denove invitita partopreni la Nokton de la Libroj, ĉiujare organizatan de la Madrida Regiona Registaro, ĉirkaŭ la Internacia Tago de la Llibro, en aprilo. MEL elektis kunmemori la kvindekan datrevenon de la morto de la ĉilia poeto Pablo Neruda por prezenti ekspozicion de libroj de latinamerikaj verkistoj tradukitaj al Esperanto. La dato estis la 21a de aprilo, kaj la loko, la sidejo de Hispana Esperanto-Federacio.

Kiel menciita antaŭe MEL denove partoprenis en la sinsekva legado de la verko Don Kiĥoto, organizita de la kulturinstitucio Círculo de Bellas Artes la 20an de aprilo.

Aliflanke, Kataluna Esperanto-Federacio denove starigis budojn en la Tago de la Libro (tradicie nomata Tago de Sankta Georgo en Katalunio, la 23an de aprilo), en Barcelono kaj Sabadell. En ambaŭ budoj, la asocio disvendis la plej freŝajn eldonaĵojn kaj ankaŭ aliajn elektitajn librojn, krom diversajn aliajn objektojn, kaj profitis la okazon por informi pri Esperanto kaj pri venontaj kursoj.

## Ege interesa videofilmo.



La lengua PROHIBIDA por HITLER: el ESPERANTO | @curiosamente

Jen ege interesa kaj amuza videofilmo, kiu prezentas Esperanton al homoj, kiuj ne aŭdis pri ĝi.

Ĝi titoliĝas "La lingvo malpermesita de Hitlero: Esperanto" kaj estas farita en la hispana lingvo.

Trovebla ĉe:

https://www.youtube.com/watch?v=81kgO17qCCo&t=1s


Imagu (Imagine) - John Lennon - (Esperanto version) - en la Stela Domo

## Imagu, de Lennon, en Esperanto.

En Interreto ekzistas veraj juveloj, kiel la fama kanto "Imagine" – "Imagu" en Esperanto.

Vidu kaj aŭskultu ĉe:

https://www.youtube.com/watch?v=eUwQvfANl48

## TRA LA MONDO …

## Unuafoje Universala Kongreso en Afriko. Aruŝo (Tanzanio).

**INVITO POR UNIVERSALA KONGRESO**

# KILIMANĜARO 2024



**Esperanto-Asocio de Tanzanio, kunlabore kun Afrika Komisiono de UEA**

Por la 109-a Universala Kongreso de Esperanto (UK), okazonta en 2024, la Estraro de Universala Esperanto-Asocio (UEA) unuanime elektis Tanzanion kiel kongreslandon. La unuan fojon UK okazos en la kontinento Afriko. La gastiga urbo, Aruŝo, estas internacia turisma destino, sed ne nur: ĝi ankaŭ estas grava diplomatia urbo, la sidejo de la Orient-Afrika Komunumo kaj de la Afrika Kortumo de Afrika Unio.

La regiono de Aruŝo loĝigas pli ol 2 milionojn da homoj. Ĝi troviĝas je la orienta branĉo de la Granda Rift-Valo, sub modera klimato. La grandurbo estas proksima al la Nacia Parko Serengeti, la Konservada Areo Ngorongoro, la Nacia Parko Lago Manyara, la Gorĝo Olduvai, la Nacia Parko Tarangire, la Monto Kilimanĝaro kaj la Monto Meru en la Nacia Parko Aruŝo mem.

La Esperanto Asocio de Tanzanio (EATA) invitis kongresi en Aruŝo post multjara laboro de la Afrika Komisiono de UEA, kiu plenumis la taskon kunordigi la landajn asociojn en la kontinento por difini la invitanton de la unua UK en Afriko. La kunlaboro estis multhoma kaj internacia. Per tiu decido ankaŭ la Estraro de UEA plenumas devon de la Asocio, kiu en la pasinta jardeko deklaris la okazigon de UK en Afriko kiel strategian elementon por UEA.

La Asocio nun kunlaboros kun la lokaj aktivuloj por fiksi la datojn, lokan kongresan komitaton, temon kaj aliajn detalojn de la 109-a UK. La kongresejo estos la Aruŝa Internacia Kunveneja Centro, altnivela loko por internaciaj eventoj, kiu jam gastigis eventojn de UN. La Kongresa Fako kaj la Estraro de UEA ankaŭ kunlaboros kun ĉiuj partioj koncernataj de la okazigo de la UK, ĉu de la Esperanto-movado, ĉu de lokaj instancoj en Tanzanio. Jam eblas subteni la 109-an UK-on per donaco al la Fondaĵo Afriko de UEA: uea.org/alighoj/donacoj/afriko.

*(Komuniko de UEA. N-ro. 1095. 2023-03-01)*

## TRA LA MONDO …

### IJK 2024 okazos en Litovio.




TEJO elektis Litovion anstataŭ Tanzanio kiel landon por la Internacia Junulara Kongreso 2024. La urbo elektita estas Ŝventoji.

La respondeculoj ne klarigis, kial oni ne volis kongresi en Afriko.

Ni memoru ke la Universala Kongreso (UK) okazos en Tanzanio.

*("Libera Folio". 23/04/2023)*

### EU-subvencio savas la financojn de TEJO.

TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) ricevos subvencion de 125.000 eŭroj de Eŭropa Unio (EU). Tiu subvencio kovros pli ol 90 procentojn de la buĝetitaj elspezoj de TEJO ĉi-jare. Nun oni denove dungos oficistojn.

*("Libera Folio". 27/03/2023)*

### Denove pri la nomo "eŭro".




Nu, kiu elpensis la nomon "eŭro"?

Li estis Germain Pirlot, belga instruisto kiu somere de 1995 skribis leteron al la tiama prezidanto de la Eŭropa Komisiono, Sro. Jacques Santer, kun sia propono.

Kaj ĉirkaŭ kvar monatojn poste tiu opcio estis elektita de la ŝtat- kaj registrar- estroj de Eŭropa Unio (UE). Tamen, la Komisiono nek konfirmas nek malkonfirmas al tiu-ĉi ĵurnalo la ĉefrolon de Pirlot okaze de la naskiĝo de la eŭropa monunuo.

*("Expansión", ekonomia hispana ĵurnalo. 08/05/2023)*

Noto: Germain Pirlot estas fama kaj aktiva esperantisto.

### E-kongresoj 2023.

- 18/25 jul. 96-a SAT-kongreso. Kastelo Greziljono (Francio).
- 20/23 jul. 40-a Pola E-Kongreso. Siedlce, 96 km oriente de Varsovio.
- 29 jul/05 aŭg. 108-a Universala Kongreso. Torino (Italujo).
- 05/12 aŭg. 79-a Internacia Junulara Kongreso (IJK). Lignano (Italujo)
- 12/15 okt. 81-a Hispana Kongreso. Sevilo/Sevilla.
- 2024 IJK. Ŝventoji (Litovio).
- UK. Aruŝo (Tanzanio).

## TRA LA MONDO …

# Ĉu nova Esperanto-urbo?




Kataluna Esperanto-Asocio (KEA) kaj la magistrato de Subirats subskribis kunlaboran interkonsenton pri la havaĵo de la iama E-Muzeo kaj la ekstarigon de diversaj agadoj ligitaj al la rilato de Esperanto kaj Subirats.

Kelkdek kilometrojn sude de Barcelono situas la vilaĝo Sant Pau d'Ordal (municipo de Subirats), sufiĉe konata en Esperantujo, ĉar ĝi estis dum jaroj la sidejo de la Muzeo de Esperanto, starigita de Lluís Hernàndez-Yzal surbaze de lia enorma privata kolekto (ĉirkaŭ 8000 libroj, 15000 revuoj, medaloj, afiŝoj kaj aliaj esperantaĵoj en kapturnaj ciferoj) kompilitaj dum lia tuta vivo, kaj kiujn li malavare disponigis ĉiam al ĉiu ajn interesito.

Post lia forpaso en 2002 la muzeo stagnis dum kelkaj jaroj, remalfermiĝis en 2010 danke al la kunlaboro kun la municipa turisma fako, tamen ĝi fine devis ĉesigi la aktivadon. Bonŝance la familio kaj la magistrato mem volis eviti ke tiu enorma havaĵo, tiom valora loke kaj internaciskale, perdiĝu, kiel bedaŭrinde okazis en aliaj lokoj, tial la municipo transprenis grandan parton de la Esperanta heredaĵo de S-ro Yzal kaj konservas ĝin en la municipa arkivo.

Kvankam Subirats estas malgranda urbeto (iom pli ol 3000 loĝantoj), la tiea magistrato plene konsciis pri la aparta valoro de la ligiteco de la vilaĝo al Esperanto kaj tial ĝi ekiniciatis projekton nomatan "Espai-Esperanto" (Esperanto-spaco), kiu celas montri la rilaton de la municipo al la internacia lingvo, ĝian historian enkadriĝon kaj la personan engaĝiĝon de S-ro Yzal. Tiu Esperanto-spaco, ekspozicio de diversaj Esperantaj grafikaj materialoj, aŭdovida prezento kaj ateliero disponota al diversaj kulturaj aktivadoj, okupos tutan renovigitan halon apud la urbodomo, kiu jam estas konstruata kaj inaŭguriĝos espereble iam antaŭ la jarfino.

KEA atenteme sekvis kaj kunlaboris de ĉiam en la afero, pruvo de tio estas ke ĝi komisiis al unu el siaj estraranoj la respondecon pri la asociaj rilatoj kun Subirats. Kadre de tiu kunlaboro okazis prezento de Esperanto en la foiro Subirats Tasta'l (Subirats gustumu ĝin) fine de la pasinta novembro, kaj ankaŭ parto de la eventoj de la Zamenhof-tago okazis en Subirats.

Sed la graveco de la projekto postulis oficialigi tiun partnerecon. Tial la pasintan 11-an de marto la Urbestro de Subirats, S-ro Pere Pons, kaj S-ro Òscar Puig, prezidanto de KEA, subskribis interkonsentan dokumenton. Dum tiu tago la ĉeestantaj estraranoj de KEA kaj KEJ (Kataluna Esperanto-Junularo) krom viziti la fizikan ejon de la Esperanto-spaco partoprenis la enregistriĝon de la aŭdovida materialo, kiu spekteblos de ĉiuj vizitontoj de tiu nova projekto kiu nun estas ununura, sed kiu povas esti mejloŝtono kaj modelo por aliaj similaj agadoj, kiuj valorigu nian movadan havaĵon kaj pasintecon kiel saltotabulo al agado en la nuntempo kaj cele al la estonteco.

*(Revuo "Esperanto" de UEA. Aprilo 2023)*